

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN -PROPAGANDA

Orgaan van de VLAAMSE ESPERANTISTENBOND, POSTBUS 100, MECHELEN

Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschijnt maandelijks
Een en twintigste jaarg.
Nummer 11 (243)
NOV. 1954

Vertegenwoordiger in Nederland:
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

LIDGELDEN:
* Leden: 100 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

La Angla, Mondolingvo?

Amiko enmanigis al ni la aldonon de la gazeto „Het Parool” de la 4-a de sept. pasinta (no. 2959), en kiu oni povis legi artikolon „Por kaj Kontraŭ” pri Esperanto. La „Por” verkis s-ano Mason Stuttard, la „Kontraŭ” d-ro G. A. Dudok, privat-docento pri la moderna angla literaturo kaj la metodiko kaj didaktiko de la angla ĉe la Komunuma Universitato en Amsterdamo.

Memkompreneble la „Kontraŭ” plej interesis nin. Nu, s-ro Dudok skribis ke li preferas la anglan kiel mondolingvon pro jenaj motivoj:

a) Ĉirkaŭ 300 milionoj da homoj parolas ĝin en teritorio, dissemita tra la tuta mondo;

b) Jam miloj, ekster la angla lingvo-teritorio, lernas ĝin pro praktikaj motivoj;

c) La angla superas aliajn multe parolatajn lingvojn (ekz. la hispanan kaj rusan) ĉar ĝi havas simplan gramatikon: unu artikolon por la tri genroj singulare kaj plurale, simplan konjugacion, malmultajn deklinaciajn finaĵojn, kio favoras la lernadon.

d) Pro ĝia german-romana karaktero ĝi havas riĉan idiomon, kio krome pliiĝas ĝian lerneblon por la germanaj kaj romanaj popoloj.

e) La literaturaj kaj sciencaj produktoj donis al la angla, kiel kulturlingvo, grandan signifon.

Ni detale esploru tiujn punktojn.

a) Estas fakto ke la angla estas dissemita tra granda parto de la mondo kaj ke milionoj parolas ĝin. Sed oni ne neglektu ke ekz. la amerika ne estas precize la sama kiel la angla, parolata en Anglujo. La praktiko jam pruvis ke erara vort-elekto ebligas miskomprenojn

b) Tiu punkto ne havas multe da valoro por ni ĉar ankaŭ la francan, germanan aŭ italan oni multe lernas! Ĉu ni ne prave demandus kie do estas kiuj lernis la anglan, kiam montriĝas el la praktiko ke oni ne ricevas ian respondon kiam oni surstrate aŭ ie ajn intence alparolas iun en la angla? Tiurilate ni ankoraŭ bone memoras ke, ĉe la Liberiĝo, la Komandanto de la kanadaj Trupoj en norda Nederlando petis per anoncetoj kelkajn interpretistojn, sed akiris ja neniun.

c) Ni volonte akceptas ke la angla gramatiko estas pli simpla ol la hispana aŭ rusa sed estas rimarkinde ke la elementoj, substrekitaĵoj de d-ro Dudok, sammezure validas por Esperanto dum ĉi tiu krome ne konas esceptojn do ankaŭ ne neregulajn verbojn, tiel ke tiurilate Esperanto estas pli facila ol la angla.

d) Ankaŭ Esperanto posedas ĝermanajn kaj romanajn elementojn kaj krome ankaŭ slavajn, tiel ke ĝi estas same facile lernebla kiel la angla ne nur por la germanaj kaj romanaj popoloj sed ankaŭ por la slavaj. Aldonu ke Esperanto, pro sia aglutina karaktero iel similas ekz. la japanan, tiel ke ĝi neniel ŝajnas same stranga kiel la angla por la orientaj popoloj kaj do estas pli facile lernebla por ili, kion jam pruvis la praktiko.

e) Pro ĝiaj literaturaj kaj sciencaj produktoj d-ro Dudok opinias la anglan tre signifoplena. Sur tiu kampo ni rimarkigu ke tiu signifo ne tiom dependas de la lingvo mem kiom de la verkoj, aperintaj en ĝi, verkoj kiuj naskiĝis el la homa spirito kaj fiksiĝis pere de la lingvo.

En ĝenerala senco lingvo estas rime-do por esprimi la homajn pensojn kaj sentojn kaj estas egale ke tiucele oni uzas ĉu la anglan, francan aŭ alian lingvon. Se ne estus tiel, maleblus tra-

duki verkon de unu lingvo en alian. Tial ne estas mirige ke multaj verkoj en diversaj lingvoj, kiuj havas grandan kulturvaloron, estas tradukitaj en Esperanton. Esperanto posedas verkojn ekz. de Shakesperare, Ibsen, Dante, Goethe, Schiller, Vondel, Frederik van Eeden, Modach, ktp. El tio rezultas ke Esperanto taŭgas por esprimi pensojn kaj sentojn same bone kiel iu ajn lingvo.

En sia artikolo d-ro Dudok tamen koncedas ke la silabado kaj elparolo de la angla estas malfacilaj kaj ke oni devus simpligi ilin por ke la angla taŭgu kiel mondolingvo. Tute trafe, sed kiu simpligus ĝin? Ĉu la angloj mem? Tiam ni prave timu ke ni atendos ankoraŭ longe! Ne, ĝuste tiuj ortografio kaj elparolo de la angla neniigas ĉiujn argumentojn de d-ro Dudok kaj tial estas por ni tute nekompreneble kiel li preferas ja la anglan. Versajne la deziro naskis la opinion dum oni samtempe pretervidis la praktikajn barojn, ligitajn al ĝi. Des pli ĉar d-ro Dudok mem kredas ke la angla ne estos akceptata kiel mondolingvo ĉar, malgraŭ ĝia taŭgeco tiucele, tio povus vundi la nacian fieron de aliaj popoloj. El tiu vidpunkto artefarita lingvo havus pli da ŝancoj, ĉar tie ne validas mallarĝ-anima naciismo.

Ni ne diskutos ĉu oni ĉi-kaze parolu pri naciismo, sed ni nur rimarkigu ne oni ne malkovras, en la pledo de d-ro Dudok, iun logikan gvidlinion. Ni havas la nepran konvinkon ke d-ro Dudok ne scias ion pli pri Esperanto ol kion li citas el kaj legis en la verko de d-ro Manders. Tio ne sufiĉas se oni volas juĝi pri Esperanto en ties plena amplekso. Se d-ro Dudok estus ĉeestinta la Haarleman kongreson li versajne ne estus skribinta ke antaŭe necesas plia eksperimentado inter diversaj rasoj kaj klasoj, ĉar ili vere superfluas kiam oni konstatas ke okaze de niaj kongresoj, reprezentantoj de diversaj rasoj, klasoj kaj instru-teco interŝangas siajn pensojn pri ĉiaj temoj... en Esperanto.

F. WEEKE.

POEZIO!

Komence de ĉi tiu rubriko ni havas la ĝojon represi kontribuon — tradukon en versoj — de nia resaniĝinta amiko H. VERMUYTEN, kiun feliĉe ne daŭre „faligis” trafik-akcidento: koran bonvenon al li. La originalo estas poemo de Prof. P. N. Van Eyck, la konata nederlanda beletristo, kiu mortis en aprilo pasinta en Hago.

PREPARO

(Ik zal nog met U wandlen)

P. N. VAN EYCK (1887-1954)

Promenos man-en-mane
Kun vi, amikoj du,
Mi post la last-vekiĝo
En land' alia plu.

Sed mi ankoraŭ vagu,
Prefere en silent'
De la montet-deklivo
Ĉe l'bordoj de la Brent'.

Tra l'bruetanta herbo
Susuris tie spir',
Somere en vespera
Varmeto kaj malbril'.

Kuŝante mi ĝin aŭdis,
- Subite en liber' -
Ankaŭ tra mi susuris
Ĝi de herb- al herber'.

El mi, ni ĉiuj vivis
De nura la spiret', -
Kiom mi ofte serĉis
Ĉi lokon de kviet'!

Jes, restu ĝis finvenos
La dormo, mi vagant',
El ĝi l'eterna mio
Vekiĝos en ĉi land'.

trad. H. Vermuyten

(El „Preparo” - 1926)

LA MISVOJO

Himno de la pesimistoj *

Post densa mallumo ekzistas abismo,
Al kiu la lingvo rapidas;
Ni semas malfidon per simpla sofismo,
Kaj certan disfalon ni vidas.
Kaj nin ne konvinkos eĉ pruvoj po miloj,
Aŭ klaraj rezonoj, aŭ bonaj konsiloj,
Ĉar ĉiel malhelpi jam de la komenco
Ni celas kun firma intenco.

Nur fuŝa, malbela, sen ia sukceso,

Ni vidas nepropran laboron,

Eĉ guto acida, falante sen ĉeso,

Doloras plej gajan la koron.

La moko, la rido, la indiferento,

Jen estas la iloj, en ĉiu momento,

Per kiujni provas, verŝante sarkasmon,

Velkigi la entuziasmon.

Ni plendas kaj plendas, neniam laciĝas,

Pri l'tempoj pasintaj pensante;

Cent horoj perdiĝas, mil horoj perdiĝas,

Ni plendas kaj plendas konstante.

Kroniko de la Historio

Evoluo de kutimoj

En la daŭro de la regno de imperiestro Karlo V-a (unua duono de la 16a jarcento) komenciĝis en nia lando tre granda ŝanĝiĝo en la vivo de la nobeloj kaj de la burĝoj. La ĉiama kutimo, fiksita de la tradicio, cedis la lokon por la portempa modo kiun la t.n. alta klaso alprenis por apartigi sin de la „malalta” popolo. En tio oni vidas ankaŭ la foriron de la komunumece-idealo kaj solidareco de la Mezepoko, kaj la alvenon de la individuec-idealo de la *Renaissance*. Tiuj modoj aliigis loĝejojn, kutimojn, plezurojn, ĝentilec-regulojn, manĝadokutimojn ktp.

La kasteloj ĉesis esti fortikaĵoj kaj iĝis agrablaj domegoj en la kamparo. (Estas ankaŭ vere ke la senĉesaj feŭdaj militoj inter nobeloj apartenis jam al la estinto). La riĉaj familioj plie posedis hotelon en la urbo kie ili pasigis la vintron.

La amuziĝoj ne plu estis tiel bata-laj. La batalado fariĝis skermado per spado kies origino situas en Hungarujo. La turniro ŝanĝiĝis en karuselo: lerteca ludo sur ĉevaloj, veninta el Italujo.

Estas pli malfacile (kaj tro longe) priskribi la ŝanĝiĝojn de la vestajmo-do kiu estis tiel varia. Ĝenerale la vestaĵoj de la virinoj komplikiĝis, kun rigidaj formoj kaj eksterordinara amplekso. La vestaĵoj de la sinjoroj iĝis

„Laboru kaj fidu!” La homoj nin petas
„Neniam!” en ĥoro ni krie ripetas,
Obstine gruntante - neniu nin dankos,
Sed tamen la plendoj mankos.

(De Fernando Redondo, el malnova Hispana E.-Gazeto).

* (Dediĉita al la homoj, kiuj ĉiam plendas, sed nenion faras).

MEMORAĴO

En vian manon mi metis mian koron
Dum vi bedaŭron esprimis per okulo,
Kaj lastrigarde en ĉi iris an oron
Mi adiaŭis ĉe la peron-angulo.

Jen amikeco profunde spontanea!

La monotono de mia kor' refloris,

Kaj ŝajndormanta en la brud' kupea

Intimajn scenojn mi ŝate rememoris.

Vi forkaresis - ja kiel ĉe infano -

La ĝendoloron de miaj du kul-pikoj,

Kaj kiam skribas al vi ĉi tiu mano

Sekretalvokas mi por samaj kisaplikoj.

Anna Meurrens

kaj restis algluigemaj al la korpo ĝis komenciĝo de la 17a jarcento, kaj tiam malrigidaj kaj facilmovaj kiel ilin portis *Rubens*.

Depost la 16a jarcento ekzistas tre multaj kaj tre variaj dancoj kiuj, venintaj el la eksterlando, invadis la kortegojn de Bruselo kaj Meĥleno, kaj estis ĝenerale malrapidaj kaj majestaj en kiuj kavaliroj kaj sinjorinoj tenis unu la alian nur per la mano.

Plej ŝanĝiĝis la manieroj. Por manĝi, ĉiuj konis nur kuleron kaj tranĉilon. Oni prenis la viandon el la plado per la mano kaj tranĉis ĝin sur dika pantranĉo. Nur en komenco de la 17a jarcento, la „alta” klaso ĉesis manĝi „kiel la kamparanoj” kaj alprenis la forketon, venintan el Venecio. Depost tiam oni disponigis ankaŭ teleron por meti viandon sur ĝin. En tiu sama tempo, la manĝohoroj, kiuj restis nepre senŝanĝaj sur la kamparo (t.e. matenmanĝo je leviĝo; tagmanĝo je la 10-a, kaj vespermanĝo je la 17a h.) estis pli malfruigataj en la urboj kaj en la kortegoj. Tiel venis la nun ankoraŭ ekzistantaj tagmeza tagmanĝo kaj la 19hora vespermanĝo.

Nova ĝentileckodo tre rapide disvastiĝis ĉe nobeloj kaj burĝoj. Ĝi reguligis la salutadon, la akcepton de gastoj, la lokigon ĉirkaŭ tablo, la leterskribadon kun la diversaj salutformuloj laŭ rango de la adresato ktp. Tiuj reguloj estis plej strikte observataj. (Memoru la komikajn teatraĵojn de Molière). Ege malfeliĉe, tiu ĝentileckodo nenion ordonis pri korpa pureco. Oni ne banis sin! Estas sciite ke la ĉefdukino Isabella portis la saman ĉemizon dum tri jaroj! Sekretaj memornotoj el tiu tempo rakontas ke ŝiaj manoj estis ĉiam malpuraj kaj la ungoj „funebriantaj”! La lavvazoj por vizaĝoj kaj manoj restis ĝis fino 18a jarcento vere tro kaj tro malgrandaj. Nek virinoj nek viroj prizorgis sian vizaĝon. Tio faris ke je la 40a jaraĝo ili montris sulkojn, estis malglataj kaj aspektis multe pli maljunaj ol ili vere estis.

En la urboj nenio estis antaŭvidita aŭ aranĝita por forpreni la malpuraĵojn. En la domoj la nomo kiun oni donis al la necesejoj (gemakken, lieux d'aisance: facileclokoj) montras ke oni konsideris ilin kiel luksan. Kaj tio ĝis la dua duono de la 19a jarcento!! Kaj en tiuj lokoj oni kompreneble tute ne uzis akvon. Nun kiam la higieno tiel enpenetris, oni malfacile imagas ke antaŭ nelonge ankoraŭ ekzistis tiaj situacioj... eĉ ankoraŭ ekzistas en kelkaj landpartoj de nia civilizita Eŭropo.

Drs. Fernand Roose (Brugge).

LA STUDANTO

Jen la vortoj, kiuj bezonas super-signon en

Ekzerco 19 A :

Ŝatata. 1: plaĉis. 2: Ĉu ankaŭ. 3: ĉiam; ŝatatan. 4: Bedaŭrindaĵo; senĉese; serĉis. 5: ĉe ĉiu paŝo; Ĉu. 6: ŝerĉe (bone distingu la verbojn „serĉi” kaj „ŝerĉi”; kontrolu vian vortaron!); eĉ; kuraĝon; serĉis. 7: niĉo. 8: ĉesis; ŝovis. 9: gorgo raukiĝis; ektuŝis la mian (sed; mi ektuŝis! Bone distingu la verbojn „tusi” kaj „tuŝi”. Kontrolu vian vortaron!) 10: giĉeto ŝajne; poŝto; rekuraĝigan; neŝanceliĝante.

Jen la ĝusta formo de

Ekzerco 18 B :

1: ... s-ro K. petis min skribi al liaj geamikoj. (La geamikoj estas la posedo de s-ro K., kiu estas la subjekto de „petis”, ne de „skribi”, al kiu frazaro rilatas „geamikoj”. La logika subjekto de „skribi” estas „mi”. Tial: liaj geamikoj). 2: Vi estas unu el liaj geamikoj, kiuj atendis lin en la 39-a U.K. 3: Li havis akcidenton kun sia aŭtomobilo (posedo de la subjekto „li”) kaj vundis siajn (indikas pluralan posedon de la subjekto!) dekstrajn brakojn kaj kruron. 4: Li permesis al si ... li povas direkti nek sian aŭton, nek sian skribilon. 5: Lia plumo (mem subjekto, do ne: sia plumo!) ... surpaperigas liajn pensojn (Ne posedo de la subjekto!) 6: Ne povante mem skribi al sia amikino (posedo de la logika subjekto de „skribi”; skribi al la amikino de si!), li ... deziras al ŝi bonan kongreson, kiu nun ne plezurigas lin (rekta komplemento de „plezurigas”, kies subjekto estas „kiu” = la kongreso!) 7: En sia imago (= en la imago de si, ne de li! Posedo de la subjekto) li jam vidas sian (= de si) kongresamikinon tenanta sian pluvombreton (posedo de la logika subjekto de la participo „tenanta”, do la kongresamikino) super si. 8: Bedaŭrante sian ne-partoprenon (posedo de la logika subjekto de „bedaŭrante”), li deziras al siaj gesamideanoj agrablan kuneston. 9: El sia malŝanuleja lito (posedo de la subjekto: li) li sendas sian koran saluton (same). 10: Ĉi tiun lian leteron (= leteron de li!) skribis por li (komposterare mankis unu streketo!) lia flegistino. (La subjekto de la lasta frazo estas: lia flegistino. Tial taŭgas en ĉi tiu frazo nur la litero 1 antaŭ la pronomoj).

NOVAJ EKZERCOJ

Ekzerco 20 A :

Tien, kie estas streketo, metu la ĝustan korelativon en la ĝusta formo: 1: Ĉu vi konas — sinjoron, — kuras — rapide? 2: — vi vidas — sinjoron kaj — li kuras? 3: Li kuras en — direkto

kaj surhavas — ĉapelon, — vi havas. 4: — estas lia ĉapelo, ĉu ankaŭ griza? 5: Jes, — ĉapelojn oni vidas ofte kaj —. 6: — vi rimarkis — sinjoron, mi ne vidis lin, sed nun mi vidas lin —. 7: Li ne plu kuras — rapide, — antaŭ kelkaj minutoj. 8: Verŝajne li estas — laca kaj ne plu povas kuri — rapide. 9: — li havas en la mano, ĉu pezan valizon? 10: —, — mano devas porti — pezan valizon, ne povas kuri (—) — li volas.

Ekzerco 19 B :

Metu la interkrampajn verbojn en la ĝustan formon, donante al ili la finajon, sufikson kaj helpverbon bezonatajn:

1: Kiam s-ro S. (festi) sian arĝentan

jubileon, li (ricevi) zumbiciklon de la mastro. 2: (Ricevi) tian helpilon, li (senti) sin tre feliĉa. 3: Li (pensi), ke li (povi) veturi kien ajn li (voli). 4: Oni jam (averti) lin, ke li bone (vesti) sin por ne (frosti). 5: (Vesti) sin per lanaj (triki) subvestoj kaj leda surtuto, li (intenci) (fari) longan vojaĝon. 6: (Veturi), tute ne (movi) sin kaj tute ne (ĝeni) de la vento, li (ĝui). 7: Sed apenaŭ (veturi) du kilometrojn, li (teruri) (konстати), ke la motoreto subite (halti). 8: Li (klopodi) (refunkciigi) la aparaton, sed ĝi obstine (striki), tute ne (movi). 9: Li (ekŝviti), ofte (premi) la pedalojn per la piedoj. 10: (Montri), ke la benzino (esti) (malpleniĝi).....

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu al la kompilinto de la rubriko: S. S. de JONG Dzn., Waltaweg 3, Tjerkwerd bij Bolsward (Frislando), Nederlando.

POR LA DECEMBRO-FESTOJ JAM NUN FARU VIAN ELEKTON ! !

Por legado:	gld.	b. fr.
Al Torento (Engholm)	broŝ. 1,60	20,—
Infanoj en Torento (Engholm)	„ 4,—	55,—
Gajaj Edzinoj de Windsor (Shakespeare)	„ 1,50	25,—
Antonio kaj Kleopatra (Shakespeare)	„ 1,50	25,—
Josef en Dotan (Vondel)	„ 1,25	15,—
Virineto en Bluo (Stuttard)	„ 2,35	30,—
La Verda Koro (Baghy)	„ 2,25	25,—
Sep Vangofrapoj (Aszlanyi)	„ 2,35	30,—
Somera Universitato	„ 2,35	30,—
Rakontoj pri Nederlando (Duhamel)	„ 1,75	—
La Princo kaj Betty (Wodehouse)	„ 1,20	16,—
Murdo en la Orienta Ekspreso (Christie)	„ 2,35	16,—
La Nevenkebla Geno (Thijssen)	bind. 4,90	70,—
La Vojoj estas nekonataj (Kassak)	„ 2,90	40,—
Du Majstronoveloj (Storm)	„ 1,90	25,—
Vivo de Zamenhof (Privat)	„ 3,25	40,—
Vagabondo kaj Sinjorino (Kloepffer)	„ 3,—	40,—
Anstataŭa Edzino (Maxwell)	„ 3,—	40,—
Saltego trans Jarmiloj (Forge)	„ 1,75	25,—
Pro Iŝtar (Luyken)	„ 4,50	60,—
Palaco de Danĝero (Wagnalls)	„ 3,50	48,—
La Normandaj Rakontoj (Maupassant)	„ 12,—	160,—
Gösta Berling (Lagerlöf)	„ 11,—	80,—
La Nekonata Konato (Boatman)	„ 1,90	28,—
La Naiveco de Pastro Brown (Chesterton)	„ 3,25	—
Haarlem. Kun tre belaj fotoj	broŝ. 1,—	15,—
Por la studo:		
La Konsilanto (Degenkamp)	2,75	—
Esperanto Leerboek (Zondervan/Manders)	2,50	34,—
100 Vragen over Gramatica	0,35	5,—
Leidraad Esperanto-Literatuur (Degenkamp)	0,45	5,—
Gebonden Stijl (Faulhaber)	0,35	5,—
Esperanta Krestomatio	1,95	24,—
La Esperanto-Movado (Isbrücker/Stop-Böwits)	2,—	27,—
Esperanto por Infanoj (Gladstone)	1,20	—
Sub la Verda Standardo (Korte)		
Rektmetoda Kurso por infanoj. Gvidilo	2,50	—
Laborilo I 0,80. Laborilo II 1,— (12,50—12,50)		
Plena Vortaro	11,40	150,—
La Juna Vivo, lernolibro por infanoj	0,65	—
Vortoj kaj Esprimoj por komencantoj	1,15	15,50

Mendu ĉe: Libro Servo LEEN., Pythagorasstr. 122, Amsterdam.
Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse Stweg 72, Brugge (ĝiro 32.6851)

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
 Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
 Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
 Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915,
 Schr. cursus voor gevorderden: H. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm. Mej H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29 Badhoevedorp
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
 Vic-êefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

**1955 V.E.B. - Jubeljaar**

De wereld door verschijnen Esperanto-tijdschriften, meestal uitgegeven door de nationale of plaatselijke bewegingen.

Onder deze uitgaven zijn zeker enkele die zelfs een internationale verspreiding verdienen, niet alleen ten overstaan van de technisch verzorgde publicatie, maar ook voor de actuele en interessante inhoud.

De meeste Esperantisten in ons land zijn verplicht indien zij nader met deze uitgaven willen kennis maken, te abonneren, hetgeen supplementaire onkosten veroorzaakt, die wellicht niet opwegen tegen het nut; voor dergelijke abonnementen geeft men inderdaad niet zozeer om de plaatselijke beweging te steunen, zoals dit voor een eigen vereniging het geval is, doch praktisch uitsluitend voor het tijdschrift, dat men door de betaling

band met het op deze zitting te behandelen petitionnement, destijds aangeboden aan de U.N.O.

In verband hiermee werd op het Congres te Haarlem een resolutie aangenomen, waarvan de tekst, vertaald, luidt:
 Het 39e Algemene Congres van Esperanto, gehouden te Haarlem van 31 Juli tot 7 August 1954, bijgewoond door 2.100 deelnemers uit 28 landen, na een uitgebreid onderzoek en bespreking van de culturele en politieke aspecten van het talenprobleem in internationale betrekkingen, besluit eenstemmig:

1. De Esperanto-beweging bevestigt haar bereidheid om in de toekomst met alle beschikbare middelen mede te werken aan de verwezenlijking van de ideale en doelstellingen van Unesco.

2. Het Congres spreekt zijn overtuiging uit, dat de taalmoeilijkheden een van de voornaamste belemmeringen tot een beter begrip tussen de volkeren betekenen en verzoekt daarom aan alle regeringen van de Staten-Leden van Unesco hun steun te verlenen aan het Internationale Petitionnement ten gunste van Esperanto, dat zal worden behandeld in de 8e Zitting van de Alg. Verg. van Unesco te Montevideo.

Uit: De Esperantist. No. 29.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

* Aligis al L.E.E.N. la Esperanto-grupo „Unueco” en Krommenie kun 25 gemembroj. Ni kore bonvenigas la novan sekcion en nia mezo!

* Ni refoje atentigas la sekciojn pri tio, ke ni havas stokon da skeĉoj kaj teatraĵetoj, facile prezentablaj okaze de grupkunvenoj kaj festvesperoj. La gvidanto de la teatra servo, s-ro A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam, volonte sendas laŭ peto malgrandan provizon por elekto.

* La multlegata ĵurnalo „Het Parool” publikigis du longajn artikolojn (Vidu la artikolon: „La angla, mondolingvo?” p. 1.—) unu por Esperanto, kiun verkis s-ro Mason Stuttard kaj unu de d-ro G. A. Dudok, docento pri angla literaturo ĉe la Komunuma Universitato en Amsterdam, kiu pledis por la uzo de la angla lingvo kiel internacia. Enketo kombinita kun la artikoloj rezultigis, ke 94,9 procentoj de la abonantaro preferas la enkondukon de Esperanto kiel lingvo internacia. Nur 5,1 procentoj kontraŭis la enkondukon de Esperanto. Kvankam la rezulto kompreneble ne prezentas objektivan bildon pri la vera situacio, tamen estas ĝojige, ke tiom da personoj pledis por la uzo de Esperanto.

Enquôte

In October zullen door ons Bureau weer de bekende enquôte-formulieren worden verzonden om een overzicht te verkrijgen van de scholen in ons land, waar Esperanto wordt onderwezen, hetzij tijdens, hetzij buiten de gewone schooluren, meer of minder officiële, al dan niet verplicht. Daar het zeer gewenst is, dat dit overzicht zo volledig mogelijk zij en wij de overtuiging hebben, dat er nog steeds Esperanto wordt onderwezen aan groepen leerlingen, waarvan wij geen gegevens ontvingen, verzoeken wij onze lezers om medewerking voor het volledig maken van ons onderzoek. Wij zullen in het begin van October een invulformulier zenden aan de ons bekende adressen. Mocht U weten van een school in Uw omgeving, waar Esperan-

to-les wordt gegeven en heeft deze school midden October nog geen formulier van ons ontvangen, meld ons dit dan even, dan zenden wij óf aan U óf aan de school een formulier met verzoek ons de verlangde gegevens te verstrekken. Mogen wij op Uw allermedewerking rekenen voor dit onderzoek? Bij voorbaat onze vriendelijke dank.

Dir. Bur. Esperanto b/h Onderwijs.

Al la U.E.A kongreso en Bolonjo

La Philips Esperanto Klubo (P.E.K.) ĉiujare organizas eksterlandan vojaĝon. Dank' al la amika helpo de la internacie organizita Esperanto - Delegitaro ĉiu vojaĝo fariĝis sukceso. La vojaĝprezo estis malalta kaj pagebla por la meza laboristo. Ĉar en 1955 la 40a U.E.A. kongreso okazos en Bolonjo (Italio) la estraro de P.E.K. decidis organizi malmultekostan vojaĝon al ĉi tiu urbo. Por doni ideon kiel ĉi tiu vojaĝo estos organizata jen sekvas kelkaj punktoj:

1. Daŭro: 12 tagoj (de 29/7—9/8 '55).
 2. Forveturo: je la 28a vespere.
 3. Vojaĝvojo: Eindhoveno - Lieĝo - Nancy - Bern - Milano - Bolonjo.
 4. Vojaĝkostoj: f. 105.— p.p., inkluzive de: restado kaj adm.kostoj.
 5. Moderna, komforta aŭtobuso.
 6. Valida pasporto neĉesa.
 7. Gastigo en Eindhoveno (se necese) senpaga. Pluajn informojn oni petu ĉe: Zonneroosstr. 10, Eindhoven. Tel. 63577.

Montevideo

Aller ogen van de esperantisten zullen in de eerstvolgende maanden zijn gericht op Montevideo, waar koortsig gewerkt wordt aan het inrichten van een uitgebreide tentoonstelling, die een overzicht zal geven van de betekenis van Esperanto op allerlei gebied. Daartoe zijn uit alle takken van de Esperanto-beweging, door verenigingen, uitgevers en particulieren, boeken, brochures, tijdschriften en ander materiaal naar Montevideo gezonden. Deze tentoonstelling heeft ten doel de deelnemers aan de 8e Zitting van de Alg. Verg. van Unesco, te houden in Nov. en Dec. een beeld te geven van de internationale taal Esperanto, in ver-

van het lidmaatschapsgeld verkrijgt; daarenboven geven lang niet alle bladen een verminderd tarief voor buitenlandse abonnementen, zoals de V.E.B. dit reeds sedert enkel jaren, op voorstel van de Hr F. Volders, doet (40 F. indien het adres door een lid van de bond wordt aangebracht).

Ter gelegenheid van ons jubeljaar nu doen wij U het hiernavolgend, origineel voorstel: we stellen enkele abonnementen op buitenlandse Esperantotijdschriften ter beschikking van onze leden, te kiezen onder de hiernavermelde titels. Het spreekt vanzelf dat de inschrijvingen moeten beperkt worden, en daarom kan het voordeel in kwestie slechts toegestaan worden aan de 15 (vijftien) eerste leden (inwonende leden worden uitgesloten, omdat het anders zou mogelijk zijn dat eenzelfde gezin twee verscheidene tijdschriften verwerft) die het tijdschrift (slechts één) van hun keuze aan de sekretaris mededelen. Op dergelijke wijze worden diegenen die het eerst onze blad lezen, bevoordeligd, maar het is naar onze mening vanzelfsprekend dat een goed lid steeds eerst en vooral F.E. leest, vóór elke andere correspondentie, al ware het van de belastingen. U moogt natuurlijk de telefoon, de telegraaf en alle snelle verbindingsmiddelen gebruiken, op voorwaarde dat U de kosten niet in aftrek van Uw lidmaatschapsgeld brengt. En hebt U reeds uw steentje voor het jubeljaar aangebracht door storting van 150 F of meer (steunend lid; zie de oproep in het Septembernummer)?

En ziehier de keuzelijst:

1. Dansk Esperanto-blad;
2. Germana Esperanto-revuo;
3. La Suda Stelo (Jugoslavujo);
4. Amerika Esperantisto;
5. Franca Esperantisto;
6. Jarlibro de UEA.

De aanvang van het abonnement is vastgesteld op 1 Januari 1955.

Vlaams Esperanto-Instituut...
... atentigas pri la fakto ke en sia ĉemeta (ankaŭ en septembro kaj oktobro) cirkulero —la verda-folieto— estas erare presito la nro de la poŝtĉekkonto: devas esti 3268.51 anstataŭ: 326857!

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.
Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).
Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.
Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)
Koresponda kurso: A. Nysstraat 37, Anderlecht

LETERO de la SEKRETARIEJO

Karaj Gemembroj,

Unue ni deziras anonci al vi ke la financa situacio de la Ligo multe plibonigis. Dank al komuna organizo de la jarkongresoj, komuna eldono de la gazeto kaj la avareco (!) de la kasistino, la deficeito konstante reduktiĝis; ni antaŭvidas ke baldaŭ ĉiaj ŝuldoj estos for.

La kotizoj restos la samaj kiel pasintjare. Repagu baldaŭ, karaj gemembroj, tiel vi evitos cerbumadon pri tiu ŝarĝo en la malfacila periodo de la jarfino kaj jarkomenco; ...kaj vi feliĉigos nin!

Kompreneble, vi restos aktivaj gemembroj de UEA kaj klopodos varbi la samideanojn kiuj ne jam aliĝis al tiu Universala Asocio. Ni tion ŝuldas al UEA kiu realigas vere rimarkindan laboron. Pri nun precipe streĉu la fortojn, ĉar ni bezonas ĉies senkondiĉan helpon kaj subtenon por niaj „atakoj“ al Eŭropa Konsilantaro kaj UNESKO! Ĉar jen, karaj geamikoj, tiuj-ĉi instancoj pli kaj pli suferas (ĝis nerviĝo) pri la lingvodiverseco (despli ĉar eniras pli kaj pli da nacioj) kaj jam ne malmultaj inter iliaj membroj direktas siajn okulojn al Esperanto kaj klopodas elabori ian solvon. Precipe niaj geinstruistoj devas atenti pri tio kaj atentigi kolegojn!

Post tio ni venas al la grava punkto: organizo de kursoj. Estas nun la oportuna momento por alparoli geinstruistojn kaj veki ilian intereson. En venonta kunveno ni komunikos pli pri tio. Laŭ ĝenerala konstato, la propagando por kurso ne estas sufiĉe preparita. En la nuna epoko nura apelacio al idealismo ne plu efikas. Unualoke necesas nin direkti al tiuj personoj kiuj povas havi praktikan utilon per Esperanto. Tio iĝas certe la kazo ĉe la geinstruista korpuso.

La kunlaboro inter la du neŭtralaj landaj asocioj iĝis ankaŭ pli kaj pli harmonia. Komunaj interesoj ricevis unuecan solvon. La du ligaj kasistinoj preparos komunan vojaĝplanon por la venonta universala kongreso en Bologno (Italujo). Komuna gazetarservo estas pristudata.

D-ro T. Van Gindertaelen repre-

zentos nin en la Loka Komitato de la Beneluxsa Kongreso en Utrecht, proksiman jaron.

Ni devas pliproksimigi nian Ligon al la Flandraj kulturasocioj. Estas fakto ke en tiuj medioj ni estas tro malmulte konataj. Tio estas nia kulpo. Ankaŭ tie devas ekzisti eblecoj por reciprokaj helpo kaj servoj. Same pri tio vi eble aŭdos baldaŭ pliajn novaĵojn. Intertempe ni konsilas al niaj reprezentantoj kaj sekcioj ke ili ekzameniu la dezirindecon por kunlaboro aŭ almenaŭ kontakto.

Karaj gemembroj, ni deziras apelacii al via bonvolemo por praktike helpi al la disvastigo de nia movado. En okazo de neceseco ĉu vi estus preta helpi al kelkaj teknikaj laboroj: ciklostilado, tradukado, ktp. ktp.? Ĉu vi estas specialisto en io ajn?

Por fini: vi ne forgesu la favorprezojn de interesaj libroj el nia Instituta stoko.

ANGULO DE LA KASISTINO

La kasistino dankas la frupagintojn enlandajn kaj de la kolonio.

- petas la grupajn kasistojn jam komenci la enkasigon por ke niaj membroj ne devu pagi ĉiujn kotizojn je la nova jarkomenciĝo,
- esperas ke ankaŭ la izolaj anoj ne tro longe atendos por pagi la kotizojn kaj tiel multe plifaciligos al ŝi la laboron,
- petas la abonantojn, precipe tiujn kiuj antaŭe estis anoj, rigardi en sia monujo por vidi ĉu ĝia enhavo ne permesas ree aniĝi.

Antaŭan dankon al ĉiuj!

KOTIZOJ

MEMBRO (F.E. kaj UEA-AM) 100 fr.
SUBTENO (same) minimume 150 fr.
GEJUNULOJ (malpli ol 21 j.) 50 fr.
FAMILIA MEMBRO
(De Esperantist) 25 fr.
AMIKO (same) 20 fr.
ABONO 75 fr.

Notu: je la favorprezo de 40 Fr. la anoj povas donaci abonon al korespondanto (ĉi-tio nur validas por membroj pagintaj la kotizon!)

Pagojn oni faru al P.C. 2321.50 de V.E.B. Raapstraat 74, GENT.

LA GIMNAZIO

de: *Salom Alejhem*el la hebrea: *d-ro L. L. Zamenhof*

(Komenco: antaŭa numero)

Sed mi estas ja viro, ne virino, tial mi trankviliĝis kaj diris al mi: estu la afero propeka ofero, hebrea ja al kutimiĝis... Sed iru, parolu kun ŝi! Ŝi enbatis en sian kapon la frenezajon, unu fojon por ĉiam, ne pre devas esti gimnazio! Mi parolas al ŝi: „diru al mi, mia kara, por kio vi tion bezonas? Kontraŭ la milita servo? Li, dank' al Dio, estas ja garantiita”, mi diras, „li estas ja solinfano; por laborenspezi”, mi diras, „mi ankaŭ bezonas tion kiel balaaĵon; kion” mi diras, „ĝi min malhelpas, se li estos butikisto simile al mi, aŭ komercisto simile al ĉiuj aliaj hebrea? kaj se eble la sorto decidis, ke li estu riĉulo, bankiero, tio min ankaŭ ne afliktus”. Tiel mi parolas kaj admonas. Sed ĉu la muro ion aŭdas? „Pli bone estas”, ŝi diras, „ke li ne eniris en la „mladše prigotovitelne”; ne granda malfeliĉo; pli bone estos, se li eniros, rekte en la „starše prigotovitelne” 4). — Nu, kion fari! Vi volas „starše prigotovitelne”, — estu „starše prigotovitelne”; ĝi certe estas por mi tre grava afero! la knabo havas ja kapon, kian vi ne trovos, eĉ se vi traveturos tutan imperion... Sed kio estis la fino? Kiam venis la ĝusta prezentiĝo, li denove ricevis „du”, jam ne de matematiko: lia *skribado* estas ne tute, kiel oni bezonas! tio estas, li skribas bone, sed nur pri unu litero li estas iom ne tute en ordo, pri la litero „jat” 5) por diri pli ĝuste, li skribas ĝin, la literon „jat” — kial li ĝin ne skribus? sed lia malmerito estas, ili diras, li skribas ĝin ne tie, kie oni devas. Efektive, granda malfeliĉo! Mi tute ne scias, kiamaniere mi veturos al Poltavo aŭ al Lodz por la foiro, se li, Dio gardu, ne skribos la „jat” tie, kie ili tion deziras! Nu, mi diras al vi, kiam oni sciigis al ni la novaĵon, tiam ŝi, kompreneble, fariĝis tute furioza: ŝi flugis al la direktoro, ŝi klarigis, ke la knabo ĉion bone scias, ke li en ĉio estas forta; por pruvo, ŝi diris, oni lin voku, oni lin ekzamenu denove, de la komenco... Kompreneble, oni ŝin atentis, kiel la pasintjara neĝon; oni enskribis „du” -on, kaj ankoraŭ kian duon! duon kun minuso! 6) kaj nun kuru kaj insultu!... Komenciĝis kriado kaj tumulto: mia Dio, denove li ne sukcesis en la ekzameno! „Nu, kio do estas?”, mi diras al ŝi, „kion fari? Ĉu ĝi valoras, ke oni pro tio venenu al si la vivon? Hebrea”, mi diras, „ja al kutimiĝis”... Tiam ŝi, kompreneble, ekflamas kaj komencas jeta-di fajron, malbenojn kaj insultojn, tute laŭ *ilia* maniero... Sed tion ni lasu, — vere kompatinda estis *li mem*, la malfeliĉa knabo, kaj la koro doloris, kiam oni lin rigardis. Tia malfeliĉo! Ĉiuj ornamas sin per blankaj butonetoj 7), kaj li tion ne povos fari!... Mi

diras al li: „kia malsaĝulo vi estas, simpla azeno vi estas! Ĉu estas eble, ke la tuta mondo eniru en la gimnazio? Malsaĝuleto mia”, mi diras, „iu devas ja resti hejme, ĉu ne vere? kaj se vi zorgas pri la milita servo”, mi diras... Tiam ŝi fariĝas kolerega kaj furioze min atakas: „bela kompatemulo”, ŝi diras; „kiu vin petas”, ŝi diras, „ke vi lin konsolu per tiaj saĝaj paroloj? Pli bone estus”, ŝi diras, „se vi penus, ke ni ricevu por li ian taŭgan instruiston”, ŝi diras, „apartan, rusan por la gramatiko”.

Vi aŭdas? jam du instruistojn mi devas teni! unu instruisto kaj unu melamedo 8) jam ne sufiĉas! Unuvorte, disputo post disputo, venkis kompreneble ŝi, ne mi; ĉar ni ne faru al ni iluziojn: se „ŝi” volas, ĉu oni povas tiam ion kontraŭfari?

Unuvorte, kion mi rakontu al vi? Oni prenis novan instruiston, jam rusan, ne — Dio gardu — ian hebrean, *ĉi*, sed efektivan kristanon; ĉar gramatiko, vi komprenas, por eniri en la unuan klason, estas ja pli akra ol kreno; bagatelo, la gramatiko, la litero „jat”!... Nu, se mi volus rakonti al vi pri la instruisto, kiun Dio al ni sendis, estus simple honto rakonti; ni devus suferi de li plej venenitajn tagojn, li nin ĉiujn traktadis kiel senvalorajn bestojn, li ridadis kaj mokadis nin ĝuste en la vizaĝon. Li, ekzemple, — en la infero li brulu — dum la instruado de la gramatiko ne povis trovi ian alian vorton krom „ajlo” 9), t. e. ruse „ĉesnok”: „ĉesnok, ĉesnoka, ĉesnoku, ĉesnokoju” 10)... la diablo lin prenu! Se ne estus „ŝi”, tiam mi prenis lin je la kolo kaj elĵetus lin al ĉiuj diabloj kun lia bela gramatiko! Por „ŝi” ĉio estis tolerebla: ĉar la knabo ja scios, kie oni devas skribi la literon „jat”, kaj kie oni ne devas ĝin skribi! Nu, prezentu al vi, dum la vintro oni lin sufiĉe elturmentis, kaj nur ĉirkaŭ Pentekosto li devis iri al la buĉo. Kiam pasis Pentekosto, li iris kaj stariĝis al la ekzameno kaj alportis hejmen jam ne „duon” sed „kvaron” kaj „kvinon” 11). Gojo, triumfo! Gratulon, gratulegon!... Sed atendu, ne tiel rapidu kun la gratulo; oni ne scias ankoraŭ tute precize, ĉu li estas akceptita; oni tion scios ne pli frue ol en Aŭgusto! Kial nur en Aŭgusto? kial ne tuj? Iru, demandu ilin! Sed kion fari? Hebrea ja al kutimiĝis...

Venis Aŭgusto; mi rigardas, — mia kunulino ne ripozas: de la direktoro ŝi kuras al la inspektoro, de la inspektoro al la direktoro... „Kial, vi kuradas hodiaŭ”, mi diras al ŝi, „kiel venenita muso, de Abraĉjo al Jaĉjo?”... „Kial mi kuradas?” ŝi diras; „Ĉu vi ne estas ĉitieu! Ĉu vi ne scias do, kio fariĝas en la nuna tempo en la gimnazioj, kun

la procentoj?” 12)... Nu, mia sinjoro, kio montriĝis? li ja efektive ne estis akceptita! Vi volas scii, kial? Tial ke li ne ricevis du „kvinojn”. Se la ambaŭ notoj, kiujn li ricevis, estus kvinoj, tiam, ili diras, li eble estus akceptita. Vi aŭdas? „eble”? kiel plaĉas al vi la „eble”? Nu, kion mi havis de ŝi, pri tio mi ne parolos; vere kompatinda estis *li*, la knabo: li kuŝas kun la vizaĝo kaŝita en la kuseno, kaj li ne ĉesas plori. Tio daŭris tiel longe, ĝis fine oni devis preni por li novan instruiston, ĝuste studenton de la gimnazio, kaj oni komencis preparadi lin jam por la dua blaso, en tute alia maniero, ĉar la dua klaso ne estas bagatelo: por ĝi oni bezonas jam, krom matematiko kaj gramatiko, ankaŭ geografion kun kaligrafio kaj kun mi ne scias kio ankoraŭ. Kvankam, por diri al vi la veron, mi por ĉio kune ne donus eĉ tri spesojn: peceto da talmuda komentario estas multe pli malfacila ol ĉiuj iliaj lernaĵoj, kaj eble ankaŭ pli saĝa... sed kion fari? hebrea al kutimiĝis...

Unuvorte, komenciĝis tuta seriario da lecionoj. Li levigas tre frue — la lecionoj; li faris la matenan preĝon kaj matenmanĝon — la lecionoj; la tutan tagon — la lecionoj. Ĝis malfrue en la nokto oni aŭdis, kiel li tamburas: „nominativo”, „akuzativo”, „adicitivo”, „multoblativo”... ĝi simple skrapas la orelojn. Kiu pensas pri mango, kiu pensas pri dormo? „Oni prenis malfeliĉan infanon”, mi diras, „kaj oni turmentas ĝin sen kulpo kaj sen kaŭzo! Ĝi estas ja vera kompatindaĵo”, mi diras, „la infano — Dio gardu — ja malsaniĝos!” — „Formordu al vi la langon”, ŝi diras. Nu, kion vi volas? li iris ankoraŭ unu fojon al la buĉo, kaj li alportis de ĉiuj ekzamenaj objektoj purajn „kvinojn”, nenion krom „kvinoj”! Ne mirinde! li havas ja tian kapon, kian vi ne trovos, se vi eĉ traveturos tutan imperion; kaj krom tio tia diligenta, tage kaj nokte li nur lernadis kaj ripetadis! Sekve estas ja bone? jes? Sed kiam venis la ĝusta tago, oni elpendigis en la gimnazio la nomaron de ĉiuj akceptitaj infanoj, — ni rigardas — nia tie ne estas! Komenciĝis kriado, pleregado... Kiaraj-te? tia maljustego! puraj „kvinoj” de ĉiuj objektoj! Ha, ŝi kuros, ha, ŝi kuros, ha ŝi faros tion kaj tion... Unuvorte, ŝi iris, ŝi iros, ŝi faris tion kaj tion... tiel longe, ĝis oni ŝin petis, ke ŝi ĉesu tedi al ili la kapon, tio estas, parolante inter ni, oni ŝin simple forpelis. Jes. Kaj kiam oni ŝin fine forpelis, tiam ŝi kiam granda ve-kriado enfalis en la hejman domon: „Ha”, ŝi krias, „kia patro vi estas! se vi estus”, ŝi diras, „sindonema patro, varma, kiel ĉiuj aliaj patroj, tiam”, ŝi diras, „vi ankaŭ trovus protekton, kiel la aliaj, al la direktoro protekton, konatecon, tion, alion...”. Kiel plaĉas al vi la virina ideo? „Ĉu ne sufiĉas”, mi diras, „ke mi devas konstante memori pri la pagodatoj,

pri la foiroj, pri la ŝuldatestoj, pri la kambioj, pri la protestoj kaj la diversaj aliaj malbenajoj? Eble vi volas, ke mi fariĝu bankrotulo pro via gimnazio kaj viaj klasoj, kiuj alrampis al mi jam ĝis la ĝorgo?" Vi eble pensas, ke ŝi aŭdas, kion mi parolas al ŝi? Tute ne, nenia atento! Ŝi daŭrigas sian faradon: ŝi segas kaj fajlas kaj boras kaj mordetas kiel vermo, tage kaj nokte, tage kaj nokte. „Se via edzino”, ŝi diras, „estus por vi edzino kaj via infano estus por via infano, se mi havus por vi”, ŝi diras, „eĉ plej malgrandan valoron, almenaŭ iometan...” — „Kion do?”, mi diras, „tiam estus?” — „Tiam”, ŝi diras, „vi kuŝus ĉe mi profunde en la tero, mi vin enterigus trifoje ĉiutage, vi ne povus eltombiĝi eĉ en la tago de la mondfina juĝo!” Nu, kiel plaĉas al vi tia saluto? Tio estas simple, kiel oni diras, kapti edzon kaj fari al li subitan banon per sitelo da akvo, pro la ĉarma paco! Komprenoble, mi miaflanke ankaŭ ne silentas, ĉar oni estas ja, kiel oni diras, nur homo, kaj ĉiu homo havas ja galon... Forte min envii vi tamen ne bezonas, kaj venkis komprenoble ne mi, sed ŝi; ĉar se „ŝi” volas, ĉu oni povas tiam ion kontraŭfari?

Unuvorte, kion mi rakontu al vi? Mi komencis serĉi protekton, konatecon, tion, alion; mi lasis min moki, mi suferis honton, ĉar ĉiu demandas tute prave: „vi estas, sinjoro Arono, estimata hebreo, vi estas domhavanto, kaj vi havas nur unu solan filon, kia do demono vin instigas, ke vi puŝigu kun li tien, kien oni ne devas?”... Nu, iru, rakontu al ili historion, ke mi posedas propran edzinon — cent dudek jarojn ŝi vivu, — kaj ke ŝi enprenis al si en la kapon frenezajn ideojn: gimnazio, gimnazio kaj gimnazio! Nu, kio estis plue? Vi devas scii, ke mi mem ankaŭ ne apartenas al tro grandaj mallertuloj, kun helpo de Dio mi trabatis al mi vojeton rekte tien, kien estis necese, kaj mi trafis en la kabineton de la granda sinjoro mem, la gimnaziestro. Jes! Kaj mi sidiĝis kaj komencis paroli kun li tiel kaj tiel — mi kapablas, dank’ al Dio, paroli kun granda sinjoro, se mi nur volas, piki al mi la langon oni ne bezonas. „Kion vi deziras?” li min demandas kaj petas min sidiĝi. Kaj mi respondas al li mallaŭte en la orelon: „Plej moŝta moŝto”, mi diras, „ni estas homoj ne riĉaj, sed ni havas negrandan kapitaleton kaj unu bonan neordinaran knabon kiu”, mi diras, „volas lerni, kaj mi volas, kaj mia edzino *tre* volas...” Tiam li denove demandas min: „Kion vi deziras?” Tiam mi respondas al li denove kaj mi alŝoviĝas al li ankoraŭ pli proksime: „plej moŝta moŝto”, mi diras, „ni estas homoj ne riĉaj, sed ni havas negrandan kapitaleton kaj unu bonan neordinaran knabon, kiu”, mi diras, „volas lerni, kaj mi volas, kaj mia edzino *tre* volas...” kaj mi forte

akcentas la „tre” por ke li min komprenu... Sed li havas ja gojan 13) kapon, tial li ne komprenas, kion mi aludas, kaj li diras al mi jam kolere: „kion do vi deziras?” Tiam mi nerapide enŝovas la manon en la poŝon, nerapide elprenas kaj nerapide diras al li: „pardonu min”, mi diras, „ni estas homoj ne riĉaj, sed ni havas negrandan kapitaleton kaj unu bonan neordinaran knabon, kiu”, mi diras, „volas lerni, kaj mi volas, kaj mia edzino *tre* volas...” Kaj mi prenas kaj enŝovas al li kaj premas al li la manon... Unuvorte, li komprenis, kion mi pensas, kaj li elprenas notlibreton kaj li demandas min, kia estas mia nomo, kia estas la nomo de mia filo en kaj en la kioman klason mi volas lin enirigi...

(Daŭrigota)

4) Starsij prigitovitelnij klass (ruse): pli progresinta prepara klaso.

5) La sono „je” en la rusa lingvo estas skribata en multaj vortoj ne per la litero „je”, sed per speciala litero „jat”.

6) La signo „minuso” iom malpligrandigas la valoron de la ekzamena noto.

7) La gimnazioj en Rusujo portas uni-

formon kun blankaj butonoj.

8) „Melamed” estas persono, kiu instruas hebrean lingvon, Bibliion kaj Talmudon.

9) Per ĉi tiu vorto la rusoj ofte mokas la hebreojn.

10) Imitata deklinacio de la vorto „ĉesnok”.

11) La noto „kvar” signifas „bone”, la noto „kvin” (plej alta noto) signifas „bonege”.

12) En Rusujo la lernado por la hebreoj en la nuna tempo estas afero tre malfacila. En la gimnazioj kaj en la universitatoj oni akceptas la hebreojn nur en la nombro de difinita procento rilate la nombron de ĉiuj aliaj lernantoj. En la pli granda parto de la lando la lernejoj akceptas hebreojn nur en la nombro de 3-5 procentoj; en tiuj urboj, en kiuj la loĝantaro konsistas preskaŭ ekskluzive el hebreoj, la gimnazioj akceptas nur 10 % da hebreoj, t. e. inter 10 lernantoj oni akceptas nur unu hebreon. Tiamaniere el ĉiuj hebreoj, kiuj volas eniri en gimnazion, oni povas akcepti nur tre malgrandan parton, kaj dum por ĉiu ekzameniĝanto sufiĉas, se li ricevas la notojn „3”, el la hebreoj oni akceptas nur tiujn, kiuj ricevis notojn la plej altajn („5”), kaj eĉ inter tiuj perfektuloj oni ankoraŭ faras elekton.

13) „Goj”: ne-hebreo.

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO KAJ LA ESPERANTISTARO

Ĉu vi scias . . .

ke U.E.A. estas la unusola Esperantista organizaĵo internacia, kiu sin okupas nur pri la progresigo de Esperanto, klopodante varbi ĉiujn homojn por la lingvo, sen konsidero pri iliaj opinioj religiaj, politikaj aŭ kiaj ajn, tiel plugante la grundon, kies rikolto estas disponebla ankaŭ por la tuta movado!

ke la ĉiujara **Universala Kongreso**, organizata de U.E.A. estas unu el la plej imponaj demonstracioj de la praktika apliko de Esperanto, kaj la **Internacia Somera Universitato** en ĝia kadro senegala manifestacio de la kultura rolo de nia lingvo?

ke la pli ol **2000 delegitoj de U.E.A.** (kun adresoj en la Jarlibro), kiuj donas siajn servojn al siaj kunmembroj—ĉu persone dum vizito, ĉu koresponde—estas io unika en la mondo kaj pruvas ankoraŭfoje la solidarecon de la Esperantista familio

ke U.E.A. eldonas ĉiumonatan gazeton **ESPERANTO**, kiu estas modelo de lingvo kaj stilo, kaj informas pri ĉiuj fazoj de la movado, kaj kiun oni esperas pli grandigi kaj plibonigi en la baldaŭa estonteco?

LA JARLIBRO—Aperas en du partoj; la unua parto en la printempo kun detala informo pri la Delegitoj tra la mondo, pri la Esperantistaj organizaĵoj, eldonajoj, gazetoj k.s. kaj multaj aliaj aferoj, kiujn koni devus ĉiu Esperantisto. La dua aperas en la aŭtuno kun informoj pri ŝanĝoj en la Delegitaro kaj kun, kutime, nova **fakterminaro**. La jarlibro de U.E.A. estas altvalora konsultilo por la praktika Esperantisto.

ESPERANTO—estas la oficiala organo de U.E.A. Ĝi kutime aperas en la unua semajno de la monato. En ĉiu numero troviĝas interesaj artikoloj kaj lastaj novaĵoj el la tutmonda movado.

La kotizoj estas:	Por Nederlando:	Por Belgujo:
Membro kun jarlibro	gld. 3.75	B. fr. 50.—
Membro-Abonanto	„ 10.—	„ 140.—
Membro-Subtenanto	„ 12.50	„ 180.—
Patrono	„ 50.—	„ 700.—
Dumviva Membro	„ 200.—	„ 2800.—

Aliĝu aŭ realiĝu kiel eble plej baldaŭ pagante vian kotizon al la ĉefdelegito aŭ peranto:

NEDERLANDO: Jakob Telling, Schietbaanlaan 106-a, **ROTTERDAM**, pĉk 2426-19
BELGUJO: F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, **BLANKENBERGE**, pĉk 4161-35
R.B.L.E., rue General Lotz 106, **UCCLE BRUXELLES**, pĉk 13.37.67

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 175/176: s-ro R. Iserentant, el Brugge, por V.E.B. kaj por L.E.E.N.: S-ino Dommerholt-Boshof, el Arnhem.

SOLVOJ

177. vertebrulo, ŝipveturo, malpermesi, teretaĝo, sanatorio, vermborita, piediranto, partopreni, manĝokarto, vegetarano, muskaptilo, malkonfesi, stenografi, korktirilo, koketulino, konkuranto, poŝt-ranĉilo, posedanto, mangrenado, liber-tempo, komedianto, kompatinda, kargo-boato, blondulino, graciulino, bataalkampo, apotekisto, litkovrilo, pensionulo, kamentubo. Rusto mangas feron, ĉagreno la koron.

178. *Hov.*: likva, blank, rel, klabo, estri, se, akaci, ad, vil, ten, mastrum, gap, emi, ren, astmo, krisp;

Vert.: fleks, agraf, lev, akra, impeti, bala, barok, spron, alt, eblec, ronki, situ, last, emerit, ran, oksid, miopa.

179. KUNMETU

30 naŭliterajn vortojn el la 90 subaj litergrupoj. Iliaj triaj literoj samorde legataj formas proverbon.

Litergrupoj: ajo, ajo, alm, api, apo, aro, aro, bro, ciz, ĉtr, dfr, dili, elt, ema, ema, ena, eni, eno, ent, eni, erv, erv, eti, fet, fla, fri, gfr, gno, gul, gvi, igi, iĝi, iĝo, iki, ilo, imi, int, ipo, ist, ita, kap, kei, kli, kra, kri, kro, kup, kus, lib, miĝ, neo, nkm, obs, ole, ono, opl, org, ors, ozp, pav, pie, pon, pos, pre, pri, pro, rea, reg, sil, spe, sto, sto, suk, tik, tin, tol, tri, tsi, ulo, ulo, uri, urn, ŭpo, van, vap, vat, vel, ven, vet.

Klarigo de la serĉotaj vortoj: 1. ĝi troviĝas en lito; 2. ĝi sekrecias valoran fadenon; 3. kelnero ricevas ĝin; 4. spontanee; 5. plekti fadenon per speciala ilo; 6. aparato por refreŝigi la aeron; 7. esti bilde resendata; 8. klare determini; 9. ĝi estas postlasita de io pasinta. 10. sin enmiksi; 11. politikisto kontraŭanta antaŭenirajn partiojn; 12. malcedema persono; 13. malmilde trafi per piedo; 14. frapo al ies vizaĝo; 15. li faras stratojn; 16. li ne plenumas oficialan rolon; 17. ŝatanta atentigi pri malbonaĵo; 18. personoj estrantaj la aferojn de la ŝtato; 19. personoj kiuj aĉetas kutime ĉe iu butikisto; 20. antaŭdiraĵo; 21. moviĝi dank' al vento; 22. ne seka; 23. libera; 24. malriĉulo kelkfoje faras tion; 25. trafikilo; 26. facile ekbrulanta; 27. preteksto; 28. fiago; 29. muzikisto; 30. porturista presajaĵo.

180. KRUCVORTENIGMO

Horizontale. 1. Oni buterigas ĝin; parto de preĝejo(R); pronomo. 2. ŝtonego(R); konfuzaj sonoj(R); eliĝi nevideble(R). 3. devenanta el malproksima lando(R); prefikso; kare ŝati. 4. ame-

rikano(R). 5. sentanta maltrankvilon pri la fideleco de amato; arbeto kun pikaj folioj(R). 6. plato el metalo. 7. strando; sincere respektoplena al Dio(R); loko en la haŭto, malmoliĝinta pro fro-tado(R). 8. parto de vegetaĵo(R); jarkalkulo(R). 9. signo de venko(R); komenciĝi(R). 10. ne senpere(R). 11. leviĝi kaj malleviĝi kiel faras la maro(R); ekskrementa likvaĵo(R). 12. frakcio; malbone farita.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

Vertikale. 1. io farita el nenio(R); malgranda taĉmento da soldatoj(R). 2. grandega ŝtono(R); birdo(R). 3. elpeli iun el la patrujo(R); sameco de sentoj inter pluraj personoj. 4. postuli tujan agon(R); membro(R). 5. ne preciza(R); tio per kio oni kolerigas iun. 6. ĝi gustigas la manĝaĵojn(R). 7. densaj akvovaporoj; neaŭtentika(R). 8. komuna diro(R). 9. plenda ekkrio(R); ekstrema flanko de armeo; malfacile produkti iun verkon(R). 10. ne per maŝino, sed per la manoj; konjunkcio; nombro. 11. en la pasinta tempo; facile kompreneble; partcipa finaĵo(R); 12. speco de agato(R); konciza.

Solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstraat, 21 hs., Amsterdam-Z.; la membroj de F.L.E. aŭ de R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 20/XI/1954.

Anonceto

Joseph Shkabara 2015 Berkeley Avenue LOS ANGELES 26 California, U.S.A. deziras korespondi kun Flandr(in)o kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

Plaatselijk Nieuws

Den Haag: La Haga Esperanto-Kontakt-Komitato „H.E.K.K.” aranĝis Esperantan ekspozicion de la 11a ĝis la 18a de septembro kaj Esperantan Forumon je la 20a de septembro.

La ekspozicio estis malfermata de la skabeno de instruado kaj artaĵoj, S-ro J. van Zwijndregt, kiu estis akompanata de sia edzino. En sia malferma parolado la skabeno esprimis sian favoran opinion pri Esperanto, parte nederlandlingve kaj parte esperantlingve. Inter la ĉeestantoj estis i.a. D-ro Inĝ. M. H. Damme, la estinta ĝenerala direktoro de la poŝto. La ekspozicio montris diversajn aĵojn, rilate al Esperanto, i.a. standon de la „K.L.M.” kun pluraj esperantlingvaj broŝuroj de tiu ĉi asocio. Ĉiuvespere estis provleciono, al kiu la publiko entuziasme partoprenis. Pli ol 1000 personoj vizitis la ekspozicion.

La vespero de la Esperanta Forumo estis malfermata per kantado de „La Espero”, dum kio anoj de diversaj junularuniigoj alportis flagojn de diversaj nacioj sur la podion. La Forumo estis prezidata de S-ro Maurits Dekker, la aŭtoro de la teatraĵo „La mondo ne havas atendejon”. La anoj estis S-ino J. Isbrucker, F-ino M. H. Vermaas, S-ro A. F. van Haren, S-ro L. G. C. de Jong kaj S-ro R. van Spronsen. La Forumo pritraktis multajn demandojn pri Esperanto. Maurits Dekker i.a. diris, ke li ĉeestis prezentadojn de sia teatraĵo „La mondo ne havas atendejon” en la nederlanda, sveda, germana kaj esperanta lingvoj. Dum la esperanta prezentado la publiko reagis same en la samaj momentoj kiel dum la prezentadoj en aliaj lingvoj. Tio konvinkis lin, ke Esperanto estas samvalora kiel aliaj lingvoj por esprimi la sentojn kaj komprenigi ilin unu al la alia. La salono estis plenplena. La 300 ĉeestantoj, inter kiuj estis multaj ne-esperantistoj, aŭskultis kun granda interesiĝo.

Mechelen: La sekcio denove vigle eklaboris en la nova periodo 1954—1955. La kunsidoj nun okazas ĉiusabate de 19.30 ĝis 20.30 h. en nova ejo: Kafejo „Vondel”, angulo Gildenstr. — Zoutwerf kaj ĝis nun pli ol dek membroj regule ĉeestis. Nova kurso kun 6 lernantoj okazas en la kadro de la Urbaj Vesperkursoj: Jongensschool, Louisastraat.

La Urba Biblioteko eldonis specialan kvarfolian cirkuleron, sur kiu aperas la aktuala librolisto (pli ol 150 verkoj) kaj plu aĉetos eldonajojn, se la intereso montriĝas sufiĉe vigla: ĉiu mehlenano do regule menu E-librojn!

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-bond Postbus 100, Mechelen en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. - Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)